

CENTRO DE ARMENAJ ESPLOROJ

Nekontestebla estas kontribuo de armenoj al la pola kulturo. Setliĝintaj en la Orienta Pola Ĉelimejo jam en la 13-a jarcento, armenoj interplektiĝis en la polan socion kiel riĉaj komercistoj, metiistoj kaj terposedantoj, ĉiam fidelaj al Pola Respubliko. Iliaj hodiaŭaj posteuloj fieras povante atesti, ke ilia sango fluis en la vejnoj de Teodor Axentowicz – pentristo, Karol Mikuli – lernanto de Chopin, de la patrino de Zbigniew Herbert, aŭ historiisto Sadyk Barącz, de Ignacy Łukasiewicz – eltrovinto de la petrola lampo, ĉu ankaŭ, probable, de Juliusz Słowacki. Armenajn radikojn havas ankaŭ nuntempaj konataj poloj, kiel la aktorino Anna Dymna, la fama komponisto Krzysztof Penderecki, ĉu Robert Makłowicz, la aŭtoro de popularaj kulinariaj televidprogramoj.

La plej nova armena enmigrado, post la jaro 1993, ankaŭ ne limiĝas je bazara komercado. Malgraŭ multaj administraj problemoj, en la polaj altlernejoj prelegas kelkaj sciencistoj, laboras kvar artistoj kaj kelkaj kuracistoj el la postsoveta Armenio, funkcias armenaj restoracioj.

Oni povas supozi, ke la popolo kun la 1700-jara kristana tradicio, vivanta en grandega diasporo (2/3 da armenoj vivas ekster sia lando) pliriĝigos per sia potencialo ankaŭ Pollandon. Oni devas krei por tio konvenajn kondiĉojn.

La aŭtoro de la projekto estas sociologo de 14 jaroj okupiĝanta pri la armena problemaro. Li estas la estro de unuaj polaj esploroj de la armena migrado, aŭtoro de ĉitemaj publikaĵoj (kelkaj eksterlandaj en la angla kaj armenlingve), partoprenanto de kelkaj scienckonferencoj, en tio du internaciaj en Armenio, kie li prezentis rezultojn de siaj esploroj. Li ne estas armendevna.

1. Sciencaj celoj

Armenologio en Pollando estas reprezentata de nemultaj esploristoj, plej parte de historiistoj kaj historiistoj pri arto. Funkciigo de la Centro instigus sciencajn esplorojn ankaŭ en aliaj direktoj, ekz. sociologio, etnologio, politologio, lingvistiko, historio de religioj, studoj pri Oriento, Kaŭkazo, Turkio.

Armenaj sciencistoj havas gravajn atingojn en biokemio kaj genetiko kaj tio povas interesi sciencistojn de la kreata nun medicina fakultato ĉe nia Universitato. Temas ne nur pri la sciencaj kontaktoj kun Armenio.

Armenaj komunumoj ekzistas en multaj landoj de Eŭropo kaj Proksima Oriento. Multaj sciencaj centroj en la tuta mondo esploras tiun medion kaj la Centro ankaŭ tiukampe estus peranto por la pola scienca medio, helpus ligi profesiajn kontaktojn.

2. Didaktikaj kaj edukaj celoj

La Centro gvidos kursojn de la armena lingvo por interesiĝintaj studentoj – volontuloj. En perspektivo estus organizita aparta, integra kurso de la armena lingvo kaj kulturo, kiel jam funkciantaj ĉe UMK japanaj kaj albanaj kursoj. Tio pliriĉigos la diktikan proponon de nia Universitato.

La Centro planas ankaŭ instruadon de la lingvo kaj kulturo por la infanoj de armenaj enmigrintoj, kiel en la „dimanĉa lernejo”, provorganizita en Varsovio. Tio ebligus malgrandigi la danĝeron eduki en Pollando kulturhandikapulojn, ĉar tiuj infanoj grandparte restas ekster la eduka sistemo kaj eĉ se ili lernas, ili ne ekkonas esencon de la propra kulturo. Tio povas evidentiĝi, ekz. ĉe la neceso de tuja, deviga reveno al Armenio (fino de viza validado aŭ deportado).

3. Praktikaj celoj

La Centro povas esti ankaŭ frontono por kulturaj kaj ekonomiaj kontaktoj por poloj kaj armenoj. Ekonomia kaj turisma interŝanĝo inter niaj landoj estis rompita komence de la 90-aj jaroj, kaŭze de la milito pri Karabako. La pola kapitalo enpasxas malantaŭ Kaŭkazo timeme, kvankam tie estas granda merkato por niaj varoj kaj servoj. La vakuon okupas usonaj, francaj kaj, kompreneble, rusaj firmaoj. Armenoj tamen memoras polajn produktojn kaj multaj el ili sentas sentimenton al nia lando, kie ili mem laboris aŭ plue laboras iliaj familianoj. Ekzistas neniu organizita turisma movado, kio estas barilo por polaj vojaĝantoj kaj esploristoj, devigataj pro tio al malfacilaj, individuaj streboj.